# LA EŬROPA UNIO KAJ ĜIAJ LINGVOJ

## INTERAGA KVIZO OKAZE DE LA EŬROPA JUNULARA OKAZAĴO 2023

## *TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO*

TEJO estas organizo de junaj parolantoj de Esperanto kun individuaj membroj kaj landaj sekcioj en pli ol 40 landoj.

***EUROPEAN YOUTH EVENT 2023***

***EŬROPA JUNULARA OKAZAĴO 2023***

- 9-an kaj 10-an de junio 2023, evento ĉe kaj ekster la Eŭropa Parlamentejo en Strasburgo
- 8 500 junuloj partoprenis kaj diskutis pri ideoj rilataj al la estonteco de Eŭropo kaj informiĝis pri demokratio, junulara agado kaj venontaj EU-balotoj
- TEJO ricevis subvencion de EP por la projekto "Lingvaj Perspektivoj", ĉeestis kun delegitaro de 20 personoj kaj surloke okazigis aktivaĵojn



tejo
LINGVAJ
PERSPEKTIVOJ
tejo.org
EYE
WORLD
JUNULARA ORGANIZO


WORLD
ESPERANTO YOUTH
ORGANISATION
tejo








tejo






# KION ORGANIZIS TEJO EN EJO 2023?

**Panelan diskuton**: "*Languages for Democracy: Linguistic Rights and meaningful Youth Participation*"

**Atelieron**: "*X-Language: The Impact of Sexism in everyday Communication*"

**Aktivaĵetojn ĉe budo**: "*Languages, intercultural Dialogue and everything in between*"

# EK AL KVIZO!



# ***KVIZO: STRUKTURO***

25 demandoj en 5 raŭndoj:

1. La Eŭropa Parlamento
2. Eŭropaj Balotoj
3. Lingvoj de Eŭropo
4. Minoritataj lingvoj en Eŭropo
5. Junuloj en Eŭropo

***Oni ludos en teamoj!***

# *KVIZO: KLARIGO*

Elektu vian teamon kaj teamnomon 👀

Ĉiu teamo bezonas skribilon kaj paperon (ni provizas)

Respondu prefere en Esperanto, sed vi rajtas respondi en ajna lingvo, kiun ni komprenas

Po 45 sekundoj respondtempo por ĉiu demando

Po 1 poento por ĉiu ĝusta respondo

parte akceptita marĝeno kaj pli da poentoj

# KVIZO
# parto I

# LA EŬROPA PARLAMENTO

# ***El kiom da deputitoj (Membroj de Eŭropa Parlamento) konsistas la Eŭropa Parlamento?***

(± 10 %)



# *Kiom da lingvoj estas uzataj en la Eŭropa Parlamento?*

(± 10 %)

# *Po kiom da deputitoj en la EP havas la landoj Luksemburgio, Malto kaj Kipro?*

(± 3)

## *Por kiu agado la Saĥarov-Premio estas donita ĉiujare ekde 1988?*

# ***Kiu el tiuj <u>ne</u> estas konstanta parlamenta komisiono de la Eŭropa Parlamento?***

Eksteraj rilatoj

Virinaj rajtoj kaj genra egaleco

Klimatprotektado kaj renovigebla energio

Regiona evoluo

Transporto kaj turismo

# *RESPONDOJ*

1) 705 MEP (akceptita: 635-775)
2) 24 lingvoj estas uzataj en la EP (akceptita: 22-26)
3) 6 deputitoj (akceptita: 3-9)
4) pensa libereco kaj homaj rajtoj ĝenerale
5) “Klimatprotektado kaj renovigebla energio” ne estas komisiono



# KVIZO
## parto II


# EŬROPAJ BALOTOJ

## ***Ekde kiam okazas rektaj balotoj por la Eŭropa Parlamento?***

(± 5 jaroj)

# *En kiom da landoj okazos Eŭropaj balotoj en 2024 (inter la 6-a kaj 9-a de Junio)?*

## *Kiu estas la plej granda frakcio en la Eŭropa Parlamento nuntempe (kaj prognozita)?*



# *Kiu elektas la prezidanton de la Eŭropa Parlamento?*

+ 1 aldona poento por la nomo de la nuntempa prezidanto (ekde 2022)

# *En kiuj kvar landoj malpli ol 30 % de la voĉdonantaro partoprenis en la Eŭropaj balotoj en 2019?*

½ poento po ĉiu ĝusta lando = 2 poentoj entute

# RESPONDOJ

1) 1979 (akceptita: 1974-1984)

2) 27 EU-landoj

3) Eŭropa Popola Partio (EPP)

4) La prezidanton elektas la MEP-oj (+1 por Roberta Metsola)

5) < 30% voĉdonis en Ĉeĥio, Slovenio, Slovakio kaj Kroatio

(½ poento po ĝusta lando)

# KVIZO
# parto III

## LINGVOJ DE EŬROPO

# *Kiuj <u>kvar</u> lingvoj estis la oficialaj lingvoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo en 1958?*

½ poento po ĝusta lingvo = 2 poentoj entute

## *Kiu estas unu el la oficialaj lingvoj de la EU?*

Luksemburga

Kataluna

Malta

Kimra

Turka

# ***Kiu el tiuj lingvoj ne uzas la literon ö?***

| | |
|---|---|
| Dana | Estona |
| Islanda | Hungara |
| Sveda | Finna |

# *Kiuj estas la du oficialaj lingvoj de Kosovo?*

# *En kiu eŭropa lingvo ‘anyanyelv‘ signifas ‘gepatra lingvo‘?*

# RESPONDOJ

1) Germana, franca, itala, nederlanda
   (½ poento po ĝusta lando)

2) La Malta lingvo estas oficiala EU-lingvo

3) Ne uzatas 'ö' en la dana

4) Albana kaj serba (½ poento po lando)

5) 'anyanyelv' estas hungara



# KVIZO
## parto IV

# MINORITATAJ LINGVOJ EN EŬROPO

# *Al kiu lingva familio apartenas la eŭska?*



## *En kiu EU-lando la miranda lingvo estas parolata?*

# *Kiom da landoj de la Konsilio de Eŭropo ratifis (subskribis) la Eŭropan Ĉarton pri Regionaj kaj Malplimultaj Lingvoj?*

(± 20 %)

# *Kiu lingvo estas tio?*

L'**Union Europèa** es una organizacion internacionala que recampa la majoritat dels estats del continent europèu. Aquela organizacion al còp supranacionala e intergovernamentala es estada establida amb aquela denominacion per 12 estats amb lo Tractat de Maastricht en 1993. L'Union Europèa completa compren la Comunautat Europèa, precedentament nomenada Comunautat Economica Europèa, dicha tanben *Mercat Comun*, tant coma doas formas de cooperacions institucionalizadas, la Politica Estrangièra e de Seguretat Comuna (PESC) e la cooperacion en matèria de justícia e d'afars interiors.

L'Union recampa vint e set estats europèus dempuèi lo 1èr de febrièr de 2020 : Alemanha, Àustria, Belgica, Bulgaria, Chequia, Chipre, Croàcia, Danemarc, Eslovaquia, Eslovènia, Espanha, Estònia, Finlàndia, França, Grècia, Irlanda, Itàlia, Letònia, Lituània, Luxemborg, Malta, Ongria, los Païses Basses, Polonha, Portugal, Romania e Suècia.

***En kiu lingvo oni deziras ‘Latcho dives!’ (bonan tagon)?***

# RESPONDOJ

1) La eŭska estas senparenca/izolita lingvo
2) La miranda (mirandés) estas parolata en Portugalio
3) 25 landoj ratifis la ĉarton (akceptita: 20-30)
4) La okcitana (parolata en suda Francio)
5) En la cigana/romaa lingvo oni salutas per ‘Latcho dives’



# KVIZO
# parto V

## JUNULOJ EN EŬROPO

# *Kiu lando de la EU estis la unua, kiu malaltigis la balotaĝon al 16?*

1 aldona punkto por la jaro (± 5 jaroj)

# *Kiu elcento de la loĝantaro de la EU estas junuloj (15-29-jaraĝaj)?*

(± ĉ. 3 %)

# *Kion 18-jaraĝaj junuloj rajtas ricevi per la DiscoverEU (malkovru EU)-iniciato?*

## *Kio estas granda nuntempa kampanjo de la Forumo Junulara Eŭropa?*

Malpermesu nepagitajn staĝojn!

Politiko kiel lerneja fako por ĉiu!

Senkosta publika transporto por junuloj!

Leĝigu kanabon en EU!

Studu eksterlande!

european youth forum

# *Kio estas la budĝeto de Erasmus+ por la programperiodo 2021-2027?*

Erasmus+ estas programo por movigebleco kaj kunlaboro en la kampoj de edukado, trejnado, junularo kaj sporto en Eŭropo.

(± 20 %)

# ***RESPONDOJ***

1) Aŭstrio (+1 por 2007, akceptita: 2002-2012)
2) 16,3 % aĝas 15-29 jarojn (akceptita: 13-19)
3) Vojaĝbiletojn por trajnoj (*interrail*-bileto)
4) “Malpermesu nepagitajn staĝojn!”
5) ĉ. 26 miliardoj € por Erasmus+ (akceptita: 21-31 miliardoj)

# ALDONA DEMANDO



# *Kiu estas la Eŭropa devizo (moto)?*



# *Kiu estas la Eŭropa devizo (moto)?*

Bulgara: Единство в многообразието
Dana: Forenet i mangfoldighed
Germana: In Vielfalt geeint
Angla: United in diversity
Estona: Ühinenud mitmekesisuses
Finna: Moninaisuudessaan yhtenäinen
Franca: Unie dans la diversité
Greka: Ενωμένοι στην πολυμορφία
Irlanda: Aontaithe san éagsúlacht
Itala: Unita nella diversità
Kroata: Ujedinjeni u različitosti
Latva: Vienota dažādībā
Litova: Suvienijusi įvairovę

Malta: Magħquda fid-diversità
Nederlanda: In verscheidenheid verenigd
Pola: Zjednoczona w różnorodności
Portugala: Unida na diversidade
Rumana: Uniţi în diversitate
Sveda: Förenade i mångfalden
Slovaka: Zjednotení v rozmanitosti
Slovena: Združena v raznolikosti
Hispana: Unida en la diversidad
Ĉeĥa: Jednotná v rozmanitosti
Hungara: Egység a sokféleségben

# KIU TEAMO VENKIS?





# DANKON PRO VIA KVIZEMO!

# ĈU VI EMUS KUNAGADI?

- Abonu TEJO-n en sociaj retoj kaj kontrolu en la retejo por ekscii pri niaj projektoj kaj agadeblecoj 💬
- Membriĝu en TEJO aŭ iĝu patrono por subteni la organizon 🏆

***tejo.org***

@tejoesperanto

@tejoesperanto

***eye2023.eu***

@ep_eye

@YouthEP

# ĈU VI REKONAS ĈIUJN LINGVOJN?

***PROJEKTO SUBVENCIITA DE LA:***

Европейски парламент Parlamento Europeo Evropský parlament Europa-Parlamentet Europäisches Parlament
Euroopa Parlament Ευρωπαϊκό Κοινοβούλιο European Parliament Parlement européen Parlaimint na hEorpa
Europski parlament Parlamento europeo Eiropas Parlaments Europos Parlamentas Európai Parlament
Parlament Ewropew Europees Parlement Parlament Europejski Parlamento Europeu Parlamentul European
Európsky parlament Evropski parlament Euroopan parlamentti Europaparlamentet